

Novembro 2011

La Harmonio

N-ro 230

Tutlanda Organo de Rondo Harmonia
Eldonejo : Rondo Harmonia

<< 目次 >>

- ☆ 2011年6月の関西大会でのミニ大学の発表 2~16 ページ
Budhostatuo – Aŝura (仏像—阿修羅) 竹森浩俊さん(奈良)
- ☆ Miaj Notoj pri UK 山本美郷さん(神奈川) 17~19 ページ
(7月の世界エスペラント大会について)
- ☆ ジョナサン・ジョーンズ教授を奈良に迎えて 20~21 ページ
大澤孝明さん(奈良)
- ☆ Festparolo ĉe la Komuna Kongreso Japana kaj Korea 22~25 ページ
(日韓共同開催エスペラント大会・開会式での祝賀演説)
やましたとしひろさん(鹿児島)
- ☆ 日韓共同開催大会・エスペラント界の行事 26~27 ページ



日韓共同開催エスペラント大会が 10月7~9日、韓国・城南市にて開催。開会式で日本側を代表して柴山純一さん(神奈川)があいさつをされました。(右上の写真) 大会については 26 ページを参照。

Prelego de la Esperanto-Universitateto 2011

Budhostatuo – Aŝura

Takemori Hirotoŝi

[題名] 仏像—阿修羅

[発表者] 竹森 浩俊 (奈良県奈良市)

[発表場所・日時]

第 59 回関西エスペラント大会(神戸市)
2 日目

2011 年 6 月 19 日(日)

午前 9 時 30 分~10 時 50 分



[講師紹介]

- ・ RH14 期生。1979 年、大阪 RH に入会。現在、奈良市在住。
- ・ 趣味：仏像鑑賞、万葉集、環境問題
- ・ 電気会社に勤務。会社では、環境管理の仕事に従事。

[要約]

仏像大好きな私は、最も有名な仏像の 1 つである興福寺の阿修羅を中心に、仏像の魅力についてお話します。仏像の話の中から日本文化について考える機会になればと思います。

まず、日本語の「仏像」という言葉の定義についてお話します。次に、如来、菩薩、明王、天部などの仏像の種類とその特徴についてお話します。

そして、阿修羅についてお話します。阿修羅とはどのような神で、日本にある阿修羅像にはどのようなものがあるのか、興福寺の阿修羅像の造営の歴史、阿修羅像の製造方法についてお話します。最後に今回の講演で使用しました仏像に関する専門用語を示します。

1. Enkonduko

Ĉi-foje, mi parolas pri budhostatuo. La kialo estas, ke mi ŝatas aprezi budhostatuojn. Mi havas oftajn okazojn por viziti templojn, televidi programerojn kaj legi librojn rilatajn al la budhostatuoj. Mi loĝas en Nara, kie estas multaj allogaj budhostatuo. Unu el la plej famaj estas la Aŝura-statuo en Koohuku-ĝi, laŭ mia opinio.



La unua celo de mia prelego estas prezenti la ĉarmojn de budhostatuoj laŭ la rakonto de Aŝura-statuo. La dua celo estas doni la okazon por pripensi la japanan kulturon. La budhostatuo estas unu el la japanaj kulturoj. Estas tre grave, ke oni scias siajn proprajn kulturojn kaj pripensas ilin.

Kiam oni preparolas la ĝenron de budhostatuoj, oni ne povas eviti tuŝi Budhismon. Tamen mi estas laiko en budhismon, tial mi preparolos budhismon nur resume. Bonvolu konsenti tion.

2. Pri la vorto *Bucuzoo*

Unue, mi preparolas la japanan vorton, *Bucuzoo*. Originale, la termino *Bucuzoo* montras la statuon de Budho, alivorte, Ŝakjamunio, japane *Ŝaka-njorai*. Tamen ĝenerale la termino montras la statuon de *Ĵizoo*, *Kannon*, kaj aliaj *Njorai*, kaj aliaj gardantoj aŭ sekvantoj de Budho kiel *Mĵoo* aŭ *Ten* kaj eĉ eminentaj budhanaj pastroj kiel *Kuukai* (Kooboo Daiŝi) aŭ *Ganĵin* kaj tiel plu. Sekve, la vorto *Bucuzoo* signifas ĉiujn statuojn rilatajn al la Budhismo. En larĝa senco, la vorto *Bucuzoo* povas inkludi ankaŭ pentraĵojn. Ĝenerale, la vorto *Bucuzoo* montras la tri-dimensian statuon.



Kaj en Japanio, *Bucuzoo* fariĝis el ĉefe sekvantaj materialoj : ligno, metalo, seka lako, ŝtono kaj argilo.



3. Speco de Budhostatuo

Por kompreni la Budhostatuojn, mi preparolas la specon de diaĵoj en Budhismo. Ili dividiĝas en kvar klasojn: *Njorai*, *Bosacu*, *Mjoo* kaj *Ten*. Alie, oni povas dividi en kvin klasojn, kiuj inkludas eminentajn budhanajn pastrojn: *Ganĵin* kaj tiel plu.



[La supra lumbildo en la 8a paĝo]

Njorai estas homo, kiu atingis la nirvanon, la absolutan veron, aŭ ilumiĝis. Li estas superhomo kun korpaj karakterizaĵoj, diferencaj de ordinaraj homoj. Kaj ankaŭ *Inzou* (signo por manfiguroj) estas grava karakterizaĵo de *Njorai*.

Ordinare Budhostatuo estis statuo de Budho. Nuntempe plejparto de budhostatuo estis statuo de Ŝakjamunio en la teritorio de la teravado, Sudorienta Azio. Kiam la mahajano



disvastiĝis, oni kredis ke diversaj *Njorai* ekzistas krom *Ŝaka-njorai* en la mondo. Naskiĝis *Amida-njorai*, *Dainiĉi-njorai*, *Jakuŝi-njorai* kaj tiel plu. *Njorai* estas homo, kiu iluminiĝis kaj tial vestiĝas simple sen ornamaĵo. Sed nur *Dainiĉi-njorai* lukse vestiĝas laŭ la tantra de vaĝrajano.

[La malsupra lumbildo en la 8a paĝo]

Bosacu estas homo, kiu ekzercadas kaj serĉas la iluminiĝon. *Bosacu*-statuo estis farita por savi la vivantojn kaj realigi iliajn dezirojn. *Kannon-bosacu* kaj *Ĵizoo-bosacu* estas bone popularaj kaj vaste amataj kaj adorataj. *Bosacu* estas la unua disĉiplo de *Njorai*, kaj estontece promesas esti Budho. Kiam diversaj *Njorai* naskiĝis, pligrandiĝis la nombro de *Bosacu*. *Bosacu* pave vestiĝis kun krono kaj aliaj ornamaĵoj, kies modelo estis hinda nobelo, Ŝakjamunio, antaŭekzercato. Li kunportas en la manoj diversajn posedaĵojn por realigi la dezirojn de la vivantoj.

[La supra lumbildo en la 9a paĝo]

Mjoo estas la enkorpiĝo de *Njorai*. Li armiĝis kun furioza kaj indigna mieno por malbeni kaj savi la kontraŭulojn al darmo. *Mjoo* naskiĝis el esoterismo, kies tantra montras ke universala centro estas *Dainiĉi-njorai*, aldonante elementojn el brahmanismo, hinduismo, zoroastrismo kaj tiel plu. *Fudoo-mjoo*, *Aizen-mjoo*, *Kuĵaku-mjoo* kaj tiel plu apartenas al *Mjoo*. Nur *Kuĵaku-mjoo* havas kompatan mienon.


[La malsupra lumbildo en la 9a paĝo]

Ten estas diaĵoj, kiuj loĝas en la Ĉielo por defendi darmojn. Iliaj statuoj ofte estas metitaj ĉirkaŭ *Njorai*- aŭ *Bosacu*-statuoj kiel gardantoj aŭ sekvantoj de *Njorai* aŭ *Bosacu*, same kiel *Mjoo*. *Ten* ordinare estis diaĵoj de brahmanismo kaj hinduismo, kaj poste konvertiĝis al budhismo. Ili havas diversajn rolojn kaj aspekte diferencas de homoj. *Bon-ten*, *Tajŝaku-ten*, *Kiŝŝoo-ten*, *Ŝitennoo* kaj ankaŭ *Aŝura* apartenas al *Ten*.



Mjoo (saĝo-reĝo):

Homo estas la enkorpiĝo de Njorai, armigis por malbeni kaj savi la kontraŭulojn al darmo.



- glavo
- flama aŭreolo
- longaj haroplektaĵoj
- ŝnuro

Akalo en Too-ĵi en Kioto

CITO: HISTORIO DE JAPANAJ BUDHOSTATUOJ DE KOLORO-ELDONO, KONTROLAŬTORO:MIZUNO SABUROU, ELDONO:AKCIA KOMPANIO, BIŬUCU ELDONEJO
引用:【カラー版】日本仏像史 監修・執筆 水野三郎 発行 株式会社美術出版社

Ten (diaĵo en Ĉielo):

diaĵo, kiu loĝas en Ĉielo por defendi darmojn.



- aŭreolo
- krono
- kiraso
- glavo
- krurarmaĵo
- Ĵaki(diablo)

Ĵikoku-ten(Drtraraŝro) en Too-ĵi

CITO: HISTORIO DE JAPANAJ BUDHOSTATUOJ DE KOLORO-ELDONO, KONTROLAŬTORO:MIZUNO SABUROU, ELDONO:AKCIA KOMPANIO, BIŬUCU ELDONEJO
引用:【カラー版】日本仏像史 監修・執筆 水野三郎 発行 株式会社美術出版社

4. Kio estas Aŝura

Aŝura estis iam la dio de milito en Brahmanismo. Li pentis aŭ konfesis kaj konvertiĝis al Budho, kaj fariĝis la dio por protekti Budhon. La jena rakonto restas:

“Iam Aŝura aŭskultis la predikon de Ŝakjamunio kun la diabloj por malhelpi tion. Kiam la diabloj komencis obstrukci la predikon, de kiu Aŝura emociiĝis, li koleriĝis kaj pelis ilin. Alirante al la Budho, li aŭskultis la predikon de Budho trankvile. Aŝura sekve fariĝis unu el ok gardantoj de Budhismo nomataj *Haĉibuŝuu*.”

Budhostatuo Aŝura



supoza restaŭro-bildo

CITO: HISTORIO DE JAPANAJ BUDHOSTATUOJ DE KOLORO-ELDONO, KONTROLAŬTORO:MIZUNO SABUROU, ELDONO:AKCIA KOMPANIO, BIŬUCU ELDONEJO
引用:【カラー版】日本仏像史 監修・執筆 水野三郎 発行 株式会社美術出版社

Budhostatuo Aŝura



Kendacuba, unu el Haĉibuŝuu

CITO:GAZETO SEMANA "PLIGRIMADO DE MALNOVAJ TEMPLOJ -Le 5-a, Kooaku-ĵi"
引用:雑誌 速刊 古寺名定必集(四)興隆寺 株式会社 小字権

5. Aŝura-statuoj

La Aŝura-statuo en Koohuku-ĵi kun tri kapoj kaj ses brakoj estas tre fama, sed aliaj Aŝura-statuoj ankaŭ ekzistas. Ekzemple, unu el ili estas tiu de Sanĵuusangendoo en Kioto. Ĝia timiga vizaĝo donas la imagon de la originala dio de Milito. Ĝi fariĝis el mozaikaj lignoj en la Kamakura-epoko. Alia ekzistas en la unua etaĝo de la kvinetaĝa pagodo de Hoorjuu-ĵi, kie staras grupo da modlitaj statuoj, diorama de la vivo de Ŝakjamunio. Ĉi tiu diorama prezentas la staton de nirvano de Budho, la staton de morto de Budho. Aŝura mienas trankvile, ne perdante kapon, remaĉinte la sencon de la nirvano, spite al morto de Budho. Oni diras, ke Aŝura de Hoorjuu-ĵi estis la prototipo de tiu de Koohuku-ĵi. Ĝi fariĝis el modlita statuo en la jaro 711.



6. Historio de la Aŝura-statuo en Koohuku-ĵi

Aktuale, la Aŝura-statuo en la Nacia trezora muzeo de Koohuku-ĵi estis unue entenita en la ĉefa halo, la malnova Okcidenta ora halo. La halo estis konstruita en la jaro 734 por preĝi la 1-an datrevenon de morto de Taĉibana-no-Miĉijo, patrino de la Imperiestredzino, Koomjoo. Ne pli malfrue ol unu jaro kompletigis preskaŭ 30 budhostatuoj: la ĉefa Budhostatuo, Ĵooroku (ĉirkaŭ 4.85m alta), statuo de Ŝakjamunio, du Bosacu kiel servantoj de Budho, la dek ĉefaj disĉiploj, Bon-ten, Taiŝaku-ten, Ŝitennoo, kaj Haĉibuŝuu, el kiu Aŝura estas unu gardanto. Kiam la halon atakis la forbruliĝo, kiun kaŭzis la milito de Taira-no-Ŝigehira kaj fulmoj, kaj ĝi ripetis la reconstruon, ĉiam la Aŝura-statuo estis mirakle forsavita.

epoko	kristana erao	Historio de Koohuku-ĵi
Hakuĥoo	669	Edzino de Kamatari konstruis Jamaŝina-Templon en Asuka.
	672	Jamaŝina-Templo translokiĝis landon, Jamato kaj la nomo ŝanĝiĝis al Umajasaka-Templo.
Nara	710	Translokiĝo de la ĉefurbo. Fuĵiŭara-no-Fuhito translokis Umajasaka-Templon en Heiĵoo-Palacoon, kaj la nomo ŝanĝiĝis al Koohuku-ĵi.
	721	Imperiestroj Genmei kaj Genŝoo konstruis Nordan okangulan halon, nomatan "Hokuen-doo".
	726	Imperiestro Ŝoomu konstruis Orientan oran halon, nomatan "Tookon-doo".
	730	Imperiestredzino Koomjoo konstruis Kvinetaĝan pagodon.
	734	Imperiestredzino Koomjoo konstruis Okcidentan oran halon nomatan "Saikon-doo" kaj faris statuojn de dek disĉiploj kaj Haĉibuŝuu kaj tiel plu.
Heian	813	Fuĵiŭara-no-Fujucugu konstruis Sudan okangulan halon, nomatan "Nan-en-doo".
	1017	La Kvinetaĝa pagodo kaj la Orienta ora halo brulis.
	1046	Ĉiuj haloj brulis krom Norda okangula halo kaj trezorejoj.

epoko	kristana erao	Historio de Koohuku-ĵi
Heian	1180	Ĉiuj konstruaĵoj forbrulis pro la milito de Taira-no-Ŝigehira.
	1189	La Suda okangula halo rekonstruiĝis.
Kamakura	1196	Fariĝis Juimakoĵi-statuo en la Orienta ora halo fare de budhofaristo Ĵookei.
	1202	La Brahmo-statuo fariĝis far de budhofaristo Ĵookei.
	1205	La Kvinetaĝa pagodo rekonstruiĝis.
	1207	Dek du ĉielaj generalo-statuo fariĝis en la Orienta ora halo.
	1210	La Norda okangula halo rekonstruiĝis.
	1232	Riparo de la statuoj de Haĉibuŝuu kaj dek disĉiploj en la Okcidenta ora halo.
Muromaĉi	1411	Kvinetaĝa pagodo, Orienta ora halo kaj Oojuja (Banejo) brulis.
	1415	La Orienta ora halo rekonstruiĝis, kie ĉefa budhostatuo instaliiĝis.
	1426	La Kvinetaĝa pagodo rekonstruiĝis.
Edo	1717	Brulis Ora halo, Koodoo, loĝejo, Okcidenta ora halo, Suda okangula halo, Meza pordego, Suda granda pordego.
	1819	La Ora halo rekonstruiĝis provizore per la oferoj de filantropoj.
Meiĵi	1868	Oni dekretis la leĝon pri la apartigo de dio disde budho.
	1897	Oni klasifikis la Nordan okangulan halon, la trietaĝan pagodon, kaj la kvinetaĝan pagodon kiel specialajn konservendajn konstruaĵojn.
Ŝooŭa	1959	La Nacia trezora muzeo konstruiĝis en la ruino de Ĵiki-doo(Manĝo-halo).
	1965	Oni finis malmunti kaj rekonstrui la Nordan okangulan halon.
	1974	Konstruiĝis la Provizora ora halo, kien oni transmetis la budhostatujn de Centra ora halo.
Heisei	1998	UNESKO enskribis la templon en la listo de Monda Kulturheredaĵo en la 2-a de decembro, kiel unu el historiaj monumentoj de la antikva Nara.

7. La farometodo de Aŝura-statuo

La seka lako-statuo fariĝis en Nara-epoko, same kiel la modelita statuo. La metodo de la seka lako-statuo naskiĝis en Ĉinio. En Japanio oni faris budhostatuojn per la metodo ĉefe inter la 7-a kaj la 8-a jarcentoj, kaj la metodo malprosperis post Heian-epoko.

Du metodoj estas: “Dakkacu-kanŝicu” (Seka lako kun kava kerno) kaj plisimpligita metodo, ”Mokuŝin-kanŝicu” (Seka lako kun ligna kerno). Haĉibuŝuu inkluzive de Aŝura fariĝis per la metodo “Dakkacu-kanŝicu”.

Nun mi prezentas la metodon “Dakkacu-kanŝicu”.

Unue, oni faras la kadron de ligna kerno, sur kiu oni amasigas formojn de argilo kaj faras argilo-statuojn, same kiel la metodo de la modlita statuo.

Due kelkaj kanabaj tukoj trempitaj en la pasto de lako kaj faruno estas tavole volvitaj ĉirkaŭ la argilo-statuo kaj formis bonorde ĝis 1 centimetron dika. La tavoloj malmoliĝis sub la konvena humido kaj temperaturo.

Farometodo de Aŝura-statuo



1. Modlu argilon sur la ligna kerno



2. Volvu kanab-tukojn kun lako ĉirkaŭ la argilo kaj malmoliĝu



3. Forprenu internan argilon kaj enmetu alian lignan kadron



4. Modifu por kudri la dorson



5. Perfektigu la detalojn sur la statuo per “Kokuso-uruŝi”

“Kokuso-uruŝi” : miksaĵo de la pasto havanta lakon kaj farunon kaj la pasto havanta lignorubon de pinpunglo aŭ pinpungloron

Cito:Vojaĝo tuŝante la koron de Aŝura, eldondato:2010/08/05, plano redakto:Kjuuŝuu nacia muzeo, kontrolo:Koohuku-ĵi
引用:阿修羅のころにされる旅, 2010年8月5日発行
企画・編集:九州国立博物館, 監修:興福寺


Trie la interna argilo estas forprenita kaj oni enmetas alian lignan kadron en la kavon por fortigi kaj defendi deformon de la statuo.

Laste oni perfektigas la detalojn sur la statuo per “Kokuso-uruŝi”, miksaĵo de la pasto havanta lakon kaj farunon kaj la alia pasto havantan lignorubon de pinpinglo aŭ ĝian pulvoron. Ĉi tiu statuo estas malpeza, ĉar ĝia interno estas kavo.

La metodo ”Mokuŝin-kanŝicu” estas fari la lignan kernon, kaj volvi la tavolojn de kanaba tuko rekte ĉirkaŭ la kerno. La ligna kerno estas lasita en la statuo.

8. Laste

Do mi finas klarigi Aŝura-statuon kaj budhostatuojn. Kaj laŭ mia opinio, en la budhostatuo-aprezo, grave estas tuŝi la pensojn de homoj, kiuj faris la statuojn kaj ordonis la faron al la faristoj.



Post la morto de Ŝakjamunio, disĉiploj sopiris al li, kaj kiel adoro, kulto, admiro aŭ penso, ili faris nerekte esprimatajn simbolojn (tilio, ŝtono de Budha piedo, lotuso, aŭ rado kaj tiel plu), kaj homformajn figurojn de Ŝakjamunio rekte esprimatajn sub la influo de la civilizacioj de Romaj kaj Grekaj skulptaĵoj en Gandhara (nun Norda Pakistano) antaŭ kaj post Kristo. Kaj naskiĝis diversaj statuoj de Ŝakjamunio en la vivo: naskiĝo-statuo, asketo-statuo, nirvano-statuo kaj tiel plu. Oni vokas Ŝakjamunion, kiu iluminiĝis kiel Tatagato. Sekve diversaj tatagatoj naskiĝis: pasintaj budhoj, Amitabo, Bhajŝaĵagurao kaj tiel plu. Kaj disĉiploj faris diversajn budhostatuojn kiel subtenon dum la ekzercado per profunda medito, aŭ koncentro de spirito. Nuntempe estas diversaj adorobjektoj: Njorai, Bosacu, Mjoo, aŭ bonaj diaĵoj por protekti la darmon kaj diversaj budhostatuoj estis elfaritaj. Estas menciinda la diverseco de budhostatuoj en Japanio.

Terminoj pri budhostatuoj

termino	signifo	rimarko
印相 (<i>inzoo</i>)	signo per manfiguroj	signo per manfiguroj por esprimi diversajn pensojn de tatagatoj
一本造り (<i>iciboku-cukuri</i>)	skulptado el unu ligno	Metodo por skulpti ĉefajn partojn: kapon kaj trunkon de statuo el unu ligno
光背 (<i>koohai</i>)	aŭreolo	Oni esprimas lumon de dorso de budho
乾漆造り (<i>kanŝicu-cukuri</i>)	modlado el seka lako	
羂索 (<i>kensaku</i>)	ŝnuro	Armilo por kapti diablon en nia koro aŭ ilo por savi vivantojn de sufero
邪鬼 (<i>ĵaki</i>)	diablo	Oni ofte vidas ke la kvar diaĵoj batis ĝin piede.
条帛 (<i>ĵoohaku</i>)	ĉifono	rektangula ĉifono, kelkmetrojn longa
丈六仏 (<i>ĵooroku-bucu</i>)	Ĵooroku-statuo	Budhostatuo ĉirkaŭ 4.85m alta
水瓶 (<i>suibjoo</i>)	akvopoto	En ĝi estas mielroso, kiel panaceo de senfina vivo por savi soifosuferantojn
塑像 (<i>sozoo</i>)	modlita statuo	
天衣 (<i>tenne</i>)	ĉiela tuko	malpeza oblonga tuko kiel ŝalo
肉髻 (<i>nikkei</i>)	nikkei/ montetiĝo de kapo	montetiĝo de kapo kun formo kiel renversita bovlo
秘仏 (<i>hibucu</i>)	sekreta budhostatuo	nepublika budhostatuo
百毫 (<i>bjakugoo</i>)	glabelaj lumharoj	Dekstrumaj blankaj longaj haroj
寄木造り (<i>josegi-cukuri</i>)	skulptado el mozaika ligno	metodo por kunmeti plurajn lignopartojn
螺髮 (<i>rahocu</i>)	helicaĵoj	

(Fino)

Miaj Notoj pri UK

Yamamoto Misato

Mi partoprenis en la 96-a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago de la 23-a ĝis la 30-a de julio. Mi volas raporti al vi pri kelkaj programeroj, kiuj min interesis.

1. La Himno de Esperanto "La Espero"

En la Solena Inaŭguro kaj la Fermo, ni kantis la Himnon "La Espero". Mi emociiĝis dum mi kantis la himnon en tia internacia atmosfero.

2. Internacia Koruso

En tiu ĉi Universala Kongreso mi partoprenis en la Internacia Koruso. La partoprenantoj de la Internacia Koruso povis kanti antaŭ la publiko nur post kiam ili plenumis almenaŭ du aŭ tri provkantadojn.

En la Universala Kongreso en Jokohamo, mi unuafoje partoprenis en la Internacia Koruso dank' al la kuraĝigo de mia amikino. Kvankam mi ne povis lerte kanti, la koruso plaĉis al mi. Kantante kun alilandaj esperantistoj, mi sentis min treege ĝoja. De tiam, mi volis partopreni en la Internacia Koruso de UK, se oni permesas al mi kune kanti.

<概要>

コペンハーゲンの第96回世界大会(7月23-30日)に参加し、大会会場の隣接ホテルに宿泊したことから、大会を満喫した一週間でした。私が参加したプログラムの中から、印象に残ったこと、“La Espero”、合唱、半日観光、野外コンサート、そして中級クラス学習会について紹介します。(山本美郷)

3. Duontaga Ekskurso

En la 26-a de julio posttagmeze, mi vizitis Lousiana-Muzeon, kiu estas en la norda parto de Danio. Unu esperantista kondukanto kaj dek unu ekskursanoj estis en nia grupo. Ni veturis unu horon aŭtobuse en la urbo kaj laŭ la marbordo, kiu troviĝas tuj apud Svedio. Nia kondukanto estis tre unika kaj interesa dana viro, kiu klarigis detalojn de la urbo Kopenhago. Mi estis sufiĉe kontenta dum la ekskurso. La Duontaga Ekskurso donis al ni tre bonan ŝancon komunikiĝi kun alilandanoj en Esperanto.

4. Ekstera Koncerto de Jomo kaj aliaj kantistoj

En la 27-a de julio, mi vizitis la eksteran koncertejon, kiu situas for de la kongresejo apud kanalo. Kvankam jam estis la 20-a horo, la urbo Kopenhago tamen estis ankoraŭ tre hela. Kun varmeta venteto, mi ĝuis la kantojn. Ankaŭ neesperantistoj kune



Internacia Koruso, kie kantas la aŭtoro, la tria de dekstre.

estis en la koncertejoj, ĉar la koncertejoj estis apud restoracio. Aŭdinte la esperantajn kantojn, neesperantistoj interesiĝis pri Esperanto. La prizorgantoj donis al ili broŝurojn pri Esperanto. La Ekstera Koncerto donis bonan ŝancon informi pri Esperanto.

5. Paroligaj Lecionoj per edukado.net por komencantoj kaj mezniveluloj

La gvidantoj estis Katalin Kovats kaj Sylvain Lelarge. Mi partoprenis en tiuj ĉi lecionoj por lerni iliajn instrumanierojn. Kompreneble ili gvidis lecionojn per rekta metodo. Dum la leciono, la lernantoj ofte duope interparolis kaj respondis. Tio estis tre bona maniero interkonatiĝi kun aliaj esperantistoj. En la meznivela klaso, la gvidanto metis multajn ilojn sur la tablon kaj la lernantoj devis diveni, por kio oni uzas tiujn ilojn. Post la leciono, interesitaj pri unu ilo ĉiuj alilandaj lernantinoj kolektiĝis ĉirkaŭ la instrumenta tablo kaj rigardis la mirindan ilon. Ĝi estis ilo por malgrandigi la vizaĝon per ekzercado de la buŝo. Ĝi devenas de Japanio kaj junaj japanaj virinoj havas ĝin. Ĉu vi povas imagi, kian formon ĝi havas?

(Fino)



ジョナサン・ジョーンズ教授を奈良に迎えて

大澤孝明 (奈良県生駒市)

オックスフォード大学のJonathan Jones教授が、近畿大学主催の「量子コンピュータ国際セミナー」で集中講義をするため来日するという連絡が舞い込んだのは、来日(9月7日)の前日だった。

Jones教授はNMR(原子核磁気共鳴)法による量子コンピュータの第一線の研究者だ。オックスフォードでそのJonesさんに会ったのが長町重昭先生。長町さんは京大エスペラント研究会での私の先輩で、永らく徳島大学で数学の教授を務められた方。

長町さんがコペンハーゲンの世界エスペラント大会(7月23-30日)に出席した後、イギリスでJonesさんに会った折りに、長町さんが携えていた紙袋にESPERANTOという文字を認めたJonesさんが、突然エスペラントで話しかけて来たのに長町さんはビックリ。

なんでもJonesさんがオックスフォードの学生だった頃に、かのMarjorie Boulton女史の指導の下にエスペラントを学んだことがあるのだという。エスペラントを話すのは20年ぶりだったそうだ。



興福寺五重の塔と猿沢の池の前で、Jonesさんと筆者

その Jones さんが 9 月初めに近畿大学を訪問すると聞いた長町さんから、田熊健二さんを通じて私のところに連絡をいただいた。一方、量子コンピュータ国際セミナーの開催責任者で同僚の中原教授にも、Jones さんから大澤に会いたいという連絡が行っていた。さっそく、国際セミナー会場での対面となった。

Jones さんは、セミナー後、1 日だけ自由な日があるので、ぜひとも奈良へ行きたいと希望された。地元の田熊さんと木元靖浩さんがこの希望にあわせて奈良散策の案をつくられた。9 月 13 日に近鉄奈良駅の行基像前で落ち合ったのは、田熊さん、木元さん、Jones さんと私。

まずは、登大路の奈良県庁へ行き、屋上から奈良市内を一望したあと、真夏のような太陽が照りつける中、東大寺大仏殿、二月堂、春日大社を散策した。そこここにたむろする子鹿とたわむれながら歩くこのあたりは奈良散策の定番コースだ。

日本へ行くならぜひ“*okonomiyaki*”を食べてこい、と知人に言われたという Jones さんの希望にあわせて、木元さん行きつけのお好み焼き屋で昼食。その後、奈良町の古い町屋を利用して活動しているローカル放送局「奈良ドット FM」へ。

奈良町の町屋は間口が狭く、奥が深い「うなぎの寝床」型の造りである。（ご存じのように、これは、間口の広さに比例して課税された時代のなごりだ。ヨーロッパにもこのタイプの建屋はよくあるので、その意味では“国際的”な建築様式といえるかもしれない。）その間口側が FM 放送スタジオ、奥が畳敷きの喫茶室になっていて、そこで抹茶、和菓子、軽食がいただけるようになっている。Jones さんも興味深そうに和菓子と抹茶を一服。

その後、平城宮跡の大極殿へ。これは平城京再現計画の一部として、昨年の平城遷都 1300 年祭に再建されたものである。

このあと Jones さんは田熊さん、木元さんと神戸へ向かったが、私は都合でここでお別れした。

思ってみれば、偶然に偶然が連鎖したような出会いだった。30 年ほど前、わたしが研究上の問題でたびたび議論を交わしたオックスフォードの Peter Hodgson 教授（故人）は、Jones さんが学生時代に講義を受けた物理の先生だった、という意外な発見もあった。

Malgranda estas la mondo. と言うか、Multerilata estas la socio. と言うか。これもエスペラントのなせるわざ。こんなこともあるから、人生おもしろいんだね。 (終)

Festparolo ĉe la Komuna Kongreso Japano kaj Korea

belmonto (yamasita tosihiro)
Japanio, 2011-10-08

1

Karaj amikoj kaj samideanoj!

Oni donis al mi la gloron paroli sur podio anstataŭ respektindaj eminentuloj kaj antaŭuloj. Mi parolos pri la komencaj tagoj de la interrilato de du supermezaj lernejoj japana kaj korea, pere de la korea lingvo.

Mi estis instruisto de la japana lingvo longe, en gubernio Kagoŝimo, la plej suda regiono de Kjuŝua Insulo. Antaŭ 15 jaroj



<概要>

13年まえ、はじめて金海伽耶高校にいき公園でまちあわせていると、韓国の生徒がおおごえでいいあっている。日本の生徒はみをちいさくしていた。実は話題は「あすの昼食はなににするか」であった。ことばがわからないと誤解が生じる。そのふたりが日本にきて生徒宅泊、活発に映画や漫画や歌手の話をした。だがわがやにきてしたことは、歴史教科書の秀吉や明治初期の箇所を翻訳しろということであった。ことばがわからないとほんねをかたれない。言語がちがうアジアにこそエスペラントは必要だ。生活をかたる語彙を積極的につかおう。「万」という単位があると便利だ。

mi moviĝis al la lernejo Kagoŝima-Higaŝi, kio enkondukis la korean lingvon en 1998, kaj, por mia honoro, mi fariĝis la unua instruisto, kiu instruas la korean lingvon en mia gubernio.

En Japanio preskaŭ ĉiuj lernejoj mezaj kaj supermezaj havas nur anglajn lecionojn kiel fremdan lingvon. La pozicio de la angla estas tute absoluta, kontraŭ kio studentoj havas dolĉan revon ellerni en iu tago, sed neniam realigebla por la plejmulto. Tia cirkonstanco ŝajnas al mi sama ankaŭ en Koreio, ĉar mi spektis komikan korean filmon antaŭ jaroj, titolitan “Perfekta Ellerno de la Angla”.

2

La jaro 1998 estis la 50-jara festa jaro de la fondiĝo de mia lernejo. Ni komencis serĉi ĝemelajn lernejojn fremdlandajn. Kandidatoj en Ĉinio kaj Usono estis facile trovitaj, sed ni havis nenian kontakton kun Koreio. Mi sendis pli ol 30 retleterojn al retadreso, trovitaj sur interreto, kaj laŭ peto respondoj venis. Unu el ili estis la supermeza lernejo Kimhe-Kaja, en la urbo Kimhe, apud Busano. Post 3 monatoj, en somero, mi vojaĝis al Kimhe-Kaja kun 3 studentinoj, kiuj ne scipovis la korean lingvon, krom unu, kun nur 3-monata lerno. La instruisto s-ino I Unbong bonvenigis nin ĉe la Busan-haveno, kaj kondukis nin al la lernejo. Post kelkhora bonvenigo ŝi foriris por preni sian filon de infanĝardeno, kaj la gestudentoj koreaj kaj japanaj kolektiĝe sidis sur benkoj de parko. *TIAM OKAZIS LA AFERO!*

Kiam mi revenis al la rondo, koreaj gestudentoj kverelis en streĉitaj voĉoj, svingante siajn fingrojn kaj brakojn, kaj la japanoj estis tute silentaj kaj malgrandiĝintaj inter ili pro timemo, ĉar ili tute ne komprenis, kio okazis – ĉu vi povas supozi?

Mi atente aŭskultis ilian paroladon, kaj evidentiĝis la afero. Ili parolis jene:

“Kion ni preparu por lunĉo morgaŭ?”

“Hm, io, io estos bonaj.”

“Ne, ili estas tro langopikaj, kaj la japanoj ne povos manĝi!”

“Do, kion mi preparu?”

“Vi, ion ion, kaj mi, ion, ion.”

“Tion mi ne povas kuiri!”

Jes, ĝuste tiel, ili parolis tre vigle, kaj tio ŝajnis kverelo al la japanoj, kiuj eble kredis, ke la koreo estas terura popolo kun sovaĝaj vortoj. ***Sen komprenebla lingvo, oni ĉiam miskomprenas unu la alian.***

Inter ili estis la studentino Eri, kiu duonjaron post la vizito venis Koreion kaj eniris Korjo-Universitaton, kaj loĝis ĉi tie 5 jarojn. Kelkaj tagoj en Kimhe ŝanĝis ŝian vivon. Poste ŝi konfesis al mi, ke ŝi telefonis al la tiama korea viramiko, kaj trovis, ke li parolas Kjonnam-dialektege!

Kimhe-Kaja sendis 3 homojn al la aŭtuna festivalo, kiam ni havis la kontrakton de ĝemelaj lernejoj. Sehjon kaj Ĉihje parolis multe inter japanaj gestudentoj pri mangao, animacio, kantoj, kantistoj, filmoj, vestoj, manĝaĵoj, ktp. Ĉihje poste raportis en lerneja ĵurnalo ĉi tiel: “En Japanio la patro baniĝas unuavice, la patrino lastavice.” – Hm, ĉi tio estus la kutimo en la hejmo de Eri, sed ne de ĉiuj japanoj.

Post kelkaj tagoj de hejmloĝado ĉe studentinoj, ili tranoktiĝis ĉe mi. *TIAM OKAZIS LA AFERO!*

Ili vokis min de la ĉambro de mia filino, kaj petis min traduki, kio estas skribita en la lerneja lernolibro de la japana historio. Ili montris kelkajn paĝojn pri Hidejoŝi, kaj pri Meĵi-epoka politiko kontraŭ Koreio. Jes, ***sen kompreno al la lingvo, ni ne povas paroli profundon de la koro, sed nur surface.***

3

Jam pasis 13 jaroj de ĝemelaj rilatoj inter Kagoŝima-Higaŝi kaj Kimhe-Kaja. Dume, alia studentino Majko eniris la Seulan Nacian Universitaton. Tamen dum tiuj jaroj ofte okazis malfacilaĵoj inter 2 registaroj, jen lernolibro, jen teritorio. Tiam rompiĝis multaj iro-veno-rilatoj de ambaŭ landoj. Mi skribis retleterojn multfoje al la korea lernejo, insistante, ke nia amikiĝo

ne venis de supre aŭ de potenca oficejo, sed *ni mem* konstruis paŝo-post-paŝe. Sur klopodo de ambaŭ lernejoj nia rilato ne ĉesiĝis kontraŭ multaj sociaj baroj, eĉ en krizoj de koko-malsano, porko-gripo, kaj bovo-malsano.

Junuloj ofte sopiras al eŭrop-usona kulturo, kio ŝajnas luksa kaj bonkvalita. Sed eklerminte la korean lingvon, niaj studentoj trovis la novan kulturon najbaran, tute ne konatan al ili, precipe allogajn kantistojn, multajn manĝaĵojn, ĉarmoplenan skribsistemon, historion, ktp. Ili estis ŝokitaj pro la eksciigo, kaj tute ensorbiĝis en ĝi. Aldone, ilin spronis rektaj renkontigoj kun koreaj gestudentoj. Ĉi tio okazis antaŭ 5 jaroj, kiam furoris eksplode la korea dramo “Vintra Amkanto” aŭ “Vintra Sonato” en Japanio.

4

Karaj kongresanoj!

Esperanto naskiĝis en Eŭropo, sed ĝi estas nepre necesa por ni azianoj, ĉar niaj lingvoj estas tute malsamaj. Esperanto naskiĝis en Eŭropo, tial esprimmanieroj kaj vortouzoj estas bazitaj sur eŭropaj vivoj. Post 2 horoj, en restoracio, kion vi manĝos? “Pastajon” kaj “peklaĵon”? Ne, ni ne diru ĝeneralajn nomojn. Ni diru precize, ke ni manĝu *ramenon* kaj *kimĉion* kun iom da *ŝoĉuo* aŭ *makolio*. Koreaj virinoj ofte sin vestas per *ĉimao*, kaj japanoj zonas *obion* sur *jukato* en somero. Laŭ azia kutimo, ni ambaŭlandanoj havas komunan radikon “*man*” por indiki dek mil, ĉu ne? Do, 303 '*man*' japanoj vizitis Koreion, kaj 244 '*man*' koreoj vizitis Japanion en la lasta jaro. Ĉi tia esprimo ŝajnas oportuna al ni. Ja, ni vivas en la azia vivo!

Kiuj landanoj en la mondo havas tiel intiman rilaton trans maro? Pli ol 5 milionoj interŝanĝe vizitadas ĉiujare. Precipe, ni estas la lingvokomprenantoj, kiuj povas paroli ĝis kor-profundo. Nun ni komecu babili, ridi, diskuti, eĉ disputi - trinkante, drinkante, kantante, dancante, kaj eltrovante pli konvenajn esprimojn, faru pli riĉan esperantujon inter ni.

(Fino)

日韓共同開催大会

10月7日(金)~9日(日)、韓国・城南市(ソウルの南西、ソナム市)の韓国セマウル運動中央研修院にて、第98回日本エスペラント大会と第43回韓国エスペラント大会が共同開催されました。同時に、第30回東アジア青年合宿(Komuna Seminario)も開催されました。



大会会場

参加者は、下表のとおり。参加登録者が500人ちょうど、実際の参加者も319人でした。

	実参加者	不在参加	欠席	計
日本	177	129	36	342
韓国	131	—	16	147
他の国々	11	—	—	11
計	319	129	52	500

第30回青年合宿は大会と別プログラムで実施。参加者は、8カ国42人が参加。日本からは2人。

RH会員やRH同窓会員の活動は次のとおりです。(順不同)

- * 柴山純一さん(日本エスペラント学会理事長、神奈川)は、この共催大会の発案者の一人であり、日本側の大会組織委員会の一員。
 - * やましたとしひろさん(通名 belmonto、鹿児島)は、大会の受付業務、開会式での Festparolo(22 頁参照)、Interkona Vespero での マンドリンとギター演奏、ポッドキャストの分科会を主催。
 - * 藤本律子さん(兵庫)は、Interkona Vespero での歌唱、Festa Vespero の司会、初心者番組を担当。
 - * 田平正子さん(京都)は、Festa Vespero のオークション(aŭkcio)、JEI グループ旅行の世話役。
 - * 田淵八洲雄さん(兵庫)と木谷奉子さん(徳島)は、Festa Vespero で阿波踊りを披露。
 - * 山口真一さん(愛知)は、仏教徒の分科会を主催。
- 他の参加者：山本美郷さん(神奈川)、柴山紀子さん(神奈川)、笹沼一弘さん(京都)、森川和徳さん(京都)、石部敦子さん(広島)、萩野明さん(福岡)、盛脇保昌さん(長崎)。

エスペラント界の行事

エスペラントの全国講習会や展示会等の最新情報がインターネットで公開されています。お近くのイベントをご確認ください。

<http://jei.or.jp/informo/>



※行事の詳細を知りたい方は編集部までお問い合わせください。

★ 第12回中国・四国エスペラント大会

期日: 11月12日(土)~13日(日)

会場: サンロード吉備 (岡山県総社市)

内容: 遠足、中国・四国代表者会議、講演会

<http://koki.o.oo7.jp/Esp-Chushi-taikai.htm>

★ 第60回関西エスペラント大会

期日: 2012年6月23日(土)~24日(日)

会場: クレオ大阪東 (大阪市城東区)

★ 第97回世界エスペラント大会 (UK)

期日: 2012年7月28日(土)~8月4日(土)

会場: ハノイ (ベトナム)

http://www.uea.org/kongresoj/uk_2012.html

★ 第68回国際青年エスペラント大会

期日: 2012年8月5日(日)~12日(日)

会場: 天理教網干大教会信者詰所 (奈良県天理市)

http://www.ijk2012.org/index_ja.html

★ 第99回日本エスペラント大会

期日: 2012年10月6日(土)~8日(月, 祝日)

会場: 北海道民支援センター (札幌市)

http://www.hokkajda-esp-ligo.jp/jek99/2012-10_jek99_sapporo.html



ベトナム世界大会のシンボルマーク

編集後記

今号はエスペラント文の原稿を3件いただきました。最初の方に日本語での説明がありますので、是非ともお読みください。

日韓共同開催エスペラント大会 (26頁参照)に参加しました。La 3a Komuna Seminario (1984年開催)以降、27年ぶりの韓国訪問でしたが、旧友の韓国人エスペランティストに会うこともでき、大変有意義でした。海外へは出不精ですが、時間ができたら、海外のイベントに参加したいと思います。(森川和徳)

★ La Harmonio 次号 (231号)

2012年2月発行予定。原稿締切は2012年1月31日です。皆さんの原稿をお待ちしています。

★ La Harmonio の電子ファイル

本誌 La Harmonio の PDF ファイルは、どなたでも次の URL アドレスからダウンロード (elŝuti) できます。なお、RHの維持のため、RH会費を納入いただければ幸いです。

http://esperanto.jp/arkivo_harmonio.html

La Harmonio 230号 2011年11月5日発行
編集発行 Rondo Harmonia (国際語教育協議会)

* 組織委員会書記局・La Harmonio 編集部・財務担当

〒618-0071 京都府大山崎町大山崎尻江 13-8 森川和徳

FAX 075-955-1627 電子メール kz_morikawa@yahoo.co.jp

* ホームページ <http://esperanto.jp> 電子メール officejo@esperanto.jp

* RH会費 (会計年度 1月1日から12月31日まで)

◇ RH会員お一人の場合

RH維持会費 (La Harmonio 電子版) 1,200円

RH維持会費 (La Harmonio 印刷物郵送) 2,400円

◇ ご夫婦ともRH会員の場合

RH維持会費 (LH 電子版) + 家族会費 1,800円 (1200+600)

RH維持会費 (LH 郵送) + 家族会費 3,000円 (2400+600)

* 会費払込先 郵便振替口座 01050-3-11902 加入者名「国際語教育協議会」

ゆうちょ銀行 一〇九店 当座 0011902

または 楽天銀行 マーチ支店 普通預金 3302340 「森川和徳」